

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2013

Ĵaŭdon la 11an de oktobro

61a jaro

Kalendaro

La kunvenoj komenciĝos je la 19a horo.

Kie? / Hvor? – vd. la lastan paĝon / se siste side.

Lundon la 21an de januaro (semajno 4) – mandag

Strategiplano de NEL por 2013–2017. NEL-estrarano Asbjørn Lindh preparas malneton por la landa kunveno en junio kaj petas nian helpon.

Forbundets strategiplan for 2013 – 2017. Forbundsstyremedlem Asbjørn Lindh arbeider med et utkast for landsmøtet i juni og ber om vår hjelp.

Sabaton 2. februaro (semajno 5) – lørdag

S e m i n a r i o, vidu paĝon 3

S e m i n a r, se s. 3

Lundon la 4an de februaro (sem. 6) – mandag

Klimavalg. Kvardeko da organizoj subtenas tiun kampanjon por plia atento pri la klimata krizo ĉe la aŭtuna parlamenta elekto. Enkondukos Kristoffer Haug.

Klimavalg. Et førtitalls organisasjoner støtter denne kampanjen for å få øket oppmerksomhet om klimakrisen ved årets stortingsvalg. Kristoffer Haug orienterer.

Lundon la 18an de februaro (sem 8) – mandag

Nia nova membro Kim Keyser estas spertulo pri anarĥiismo. Li prezentos siajn pensojn pri la rilato inter ĝi kaj Esperanto.

Vårt nye medlem Kim Keyser er ekspert på anarkisme. Han legger fram sine tanker om forholdet mellom den og esperanto.

Lundon la 4an de marto (sem.10) – mandag

JARKUNVENO. vidu p. 4

ÅRSMØTE. se s. 4

Lundon la 18an de marto (semajno 12) – mandag

Strategia bazo por UEA. Plurajn reformojn, i.a. pri la komitato kaj la delegita reto, proponas la internacia komisiono. Enkondukos Douglas D/ Asbjørn L.

Nytt strategisk grunnlag for UEA. Flere reformer, av bl.a. komiteen og lokalkontaktnettets, er foreslått. Innledning ved Asbjørn L./ Douglas D.

OKAZIS

22. oktobro (semajno 43)

Douglas faris ĝeneralan prezenton de la Esperanto-kursejo/ **migrula hejmo en Lesjöfors** en Värmland. Poste li rakontis pri du tre esperigaj novaĵoj: unue ke la nova interretejo pri tiu kursejo nun nomiĝas esperantosverige.se kaj estas je la senpaga dispono de ĉiuj E-organizoj kaj unuopaj uzantoj de Esperanto en Svedio (eĉ Nordio); kaj due, ke tri alte kvalifikitaj homoj estas elektitaj en la estraron de la domo.

Ĉeestis nova membro, li komprenis preskaŭ ĉiom. Postpaŭze ni interparolis kun li pri lia specialaĵo, anarĥiismo.

12. novembro (semajno 46)

Algis Kaspiravičius respondis al niaj demandoj pri **la litova lingvo**, la lasta transvivanta el la "antikvaj" hind-eŭropaj lingvoj. Ni interparolis pri la ortografio, la gramatiko kaj pri diversaj vortoj kaj esprimoj. Poste Asbjørn, estrarano de NEL, enkondukis mallongan diskuton pri strategioj por varbado, prepare al verkado de nova strategia plano por la venontaj 4 jaroj. Centra demando estas la elekto de celgrupo por nia informado. Kaj ĉu kun aliaj organizoj aŭ medioj eblus intime kunlabori sen minaci nian neŭtralecon? Fine ni demandis al ni kion ni povos entrepreni okaze de la Lingvojaro 2013.

3. decembro (semajno 49)

La fono de la kunvena temo estis la problemo, ke NEL iĝis malpli videbla en la socio post sia ekziĝo el du tegmentaj organizoj pro sia neŭtraleco.

Ebla solvo estus **starigo de norvega sekcio de SAT**, aŭ simple memstara E-organizo, kiu estus pli libera engaĝiĝi politike. Sed kondiĉo estas, ke troviĝus sufiĉe da aktivuloj sur sociaj aŭ politikaj kampoj por fari tion. Eblas ankaŭ membriĝi en organizoj politike neŭtralaj (sed malpli agemaj), ekz-e nia klubo videblas en la membrolisto de **Skeds-mokorset Kulturforum**. Kaj unuopaj membroj ĉiam povas aktivi en ĉiaj aliaj organizoj, ne kaŝante sian esperantist-econ. Ni legis salutmesaĝojn de la sveda SAT-sekcio, kiu apenaŭ aktivas nuntempe. Dum la kunveno alvenis du japanaj gastoj, kaj poste ni diskutis niajn planojn por la landa kongreso en Oslo kaj la Lingvojaro 2013.

17. decembro (semajno 51)

Laŭtradicie ni dediĉis la decembro-mezan kunvenon al la **Esperanta literaturo**. Asbjørn prezentis klasikan kaj siatempe epokfarantan poemaron, *Streĉita kordo* (eldonita 1931), de Kálmán Kalocsay. *Panoramo de Esperanta literaturo* (1979) de Marina Ĝivoje prezentis Douglas, citante el la antaŭparolo ke la lingvo kaj la literaturo ambaŭ nutriĝas kaj kreskas unu el la alia. La libro katalogas kaj parte prijuĝas verkojn de ĉirkaŭ mil aŭtoroj. Otto regalis nin per ampleksa pritakso de la grukoj de Piet Hein, kun ekzemploj el la Esperantotradukoj de Poul Thorsen (1956) – kaj unu memfarita. Fine Kjell Peder montris al ni eldonaĵon de la litovia klubo de Panevežys, *Vilaĝano*, (E-traduko 1978) de Dioni-

zas Poška, rakonton el la servuta vivo en la 18a jarcento, ĉiupaĝe ilustritan per grandaj linoleumaj gravuraĵoj.

Kaj nature Ĝivoje en sia *Panoramo* mencias ankaŭ ke "P. Thorsen tradukis la karikaturnajn aforismojn de Piet Hein: *Gruk* (1956)".

7. januaro (semajno 2)

Sojle de la lingvojarco 2013 ni diskutis ideojn pri **eventoj por videbligi Esperanton**. Ni povus inviti al ia "malferma domo" kun informprelegeto

kaj provleciono. Tion ni povus anonci en la katalogo de la "Kultura nokto" aŭtune – kun multa "konkurenco" de aliaj samtempaj aranĝoj – aŭ iun someran sabaton. Sed tio postulus fundan preparon, viglan prezenton kaj aĉeton de porkomputila projekciilo.

Alia ideo estas aranĝi ion similan en Haraldsheim dum la landa kongreso – por la aliaj gastoj, aŭ alifoje por la mastrumantoj.

DD

Seminario pri Interreto sabaton 2. februaro (semajno 5)

Kiel vi certe jam legis en la lasta numero (6) de *Norvega Esperantisto*, NEL aranĝos seminarion sabaton la 2-an de februaro (semajno 5) inter la 15a kaj la 18a horoj per Skajpo*. Ĉiuj Oslo-klubanoj bonvenos veni al Esperantonia kaj partopreni per komputilo tie. Aŭ vi povos partopreni hejme se vi mem havas Skajpon. Ambaŭokaze, **bv. anonci vin** (kaj vian skajpadreson, se vi havas) al nia oficejo ĝis **la venonta dimanĉo** (20. januaro).

LA TEMO ESTOS: Kiel ni alfrontos la novajn defiojn kaj eblecojn, kiujn la nova teĥnologia epoko donas? Kiel ni povus uzi interreton por instruado, reklamado, informado kaj varbado?

Dum la lastaj 20 jaroj ni spertis grandegajn ŝanĝojn, ĉefe pro la disvolviĝo kaj pliboniĝo de la interreto: retkursoj, retgazetoj, hejmpaĝoj, retbiblejoj, retvortaroj, la ĉiutagaj rapidaj retmesaĝoj, kaj facila senpaga kontakto kun homoj en la alia flanko de la mondo!

Ni aŭdos mallongajn enkondukojn pri terminologio, reta instruado, E@I, nova hejmpaĝo de NEL, reklamado per interreto – kaj estos ankaŭ amuzaĵo –

kaj ni provos imagi kiel nia movado aspektu en la estonteco.

Inter la prelegantoj ni havos Peter Baláž el Slovakio, la gvidanton de E@I, la organizo kiu i.a. lanĉis la grandan interretan kursejon lernu.net.

Ni konektos la partoprenantojn per la konferenca sistemo de Skajpo. Pere de ĝi ni povos alkupli ĝis 20 skajp-adresojn. Tamen estos preferinde, se la partoprenantoj laŭeble kuniĝos, uzante la saman komputilon (Skajp-adreson) ekzemple en klubejo. Sed ni havas la eblecon aldoni ankaŭ unuopajn membrojn al la konferenco.

[Mario M. /DD

*Skajpo (Skype): senpaga perkomputila telefono

Jarkunveno / Årsmøte, lundon / mandag 4. marto

Tagordo / Dagsorden

1. Aprobo de la kunvoko
 2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
 3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin retroŝte, kaj paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
 4. Jarkalkulo (same)
 5. Ricevitaj proponoj*.
 6. Elekto de estraro, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono. Ĉiuj kun anstataŭanto(j). Ankaŭ de nova elekta komisiono.
1. Godkjennelse av innkallingen.
 2. Valg av møteleder og referent.
 3. Årsrapport (sendes ut med e-post. Papirutgaven sendes til de medlemmene som ber om den).
 4. Årsregnskap (sendes på samme måte)
 5. Innkomne forslag*.
 6. Valg av styre, revisor og representant i huskomiteen – alle med vara – samt valgkomité.

*Propono de statutŝanĝo

En la lastaj jaroj vakis postenoj en la estraro (nun tiuj de vicprezidanto kaj de unu el la sekretarioj).

La estraro tial proponas jenan statutŝanĝon:

Nunvalida teksto (akceptita 2003):

§8

La ĝenerala kunveno elektas la estraron de la klubo, kiu konsistu el prezidanto, vicprezidanto, du sekretarioj, kasisto, ĝis du estraranoj, kaj du anstataŭantoj. [...]

Tiam necesos ŝanĝi ankaŭ §11 pri la taskoj de la vicprezidanto.

Nuna teksto:

La prezidanto kunvokas la estrarkunsidojn kaj gvidas ilin. Dum lia/ŝia foresto la vicprezidanto transprenas la gvidadon. La estraro estas decidpova kiam la prezidanto aŭ la vicprezidanto kaj minimume du aliaj estraranoj (aŭ anstataŭantoj) ĉeestas.

Ni proponas:

§8

La ĝenerala kunveno elektas la estraron de la klubo, kiu konsistu el prezidanto, **sekretario**, kasisto, **ĝis kvar estraranoj** kaj du anstataŭantoj.

Ni proponas:

La prezidanto kunvokas la estrarkunsidojn kaj gvidas ilin. Dum lia/ŝia foresto la **sekretario** transprenas la gvidadon. La estraro estas decidpova kiam la prezidanto aŭ la **sekretario** kaj minimume du aliaj estraranoj (aŭ anstataŭantoj) ĉeestas.

Ankaŭ:

en §12 pri raportoj de la estraraj kunsidoj: sekretarioj → sekretario

en §13 pri gvido de la klubkunvenoj: vicprezidanto → sekretario

ĈU VI HAVAS **PROPONON** por la jarkunveno? Ĝi atingu la estraron plej malfrue tri semajnojn antaŭ la kunveno – t.e. lundo de semajno 7, do la 11a de februaro. (Por statutŝanĝoj la limdato estis jam 10. januaro.)

HAR DU FORSLAG til behandling på årsmøtet? Styret må ha det senest tre uker før møtet, dvs. mandag 13. februar. (For vedtektsendringer var fristen 10. januar.)

En la vendobretaro

Lærebok for nybegynnere: Esperanto – den direkte metoden – basert på tegninger, av Stano Marček. Fotnoter og forklaringer på norsk. Egner seg ypperlig for selvstudium. Utkommet 2007 Norsk utgave 2012. 116 s. 45 kr.

Kalevala. La fama finna nacia epopeo, kies karakteriza ritmo multe influis poetojn en plej diversaj landoj. La formfidela traduko legiĝas kvazaŭ bona romano. Tradukis J.E. Leppäkoski. 392 p. 22 cm Ilus. Malmole bindita. 1985. 90 kr. (Ni interŝanĝis stoketon ĉe la finna libroservo kontraŭ nia *Peer Gynt*.)

Esperanto – över 50 miljoner träffar. [Nun > 170 milionoj!] Lars Forsman rakontas el siaj spertoj pri instruado al lernantoj el la tuta mondo dum 18 jaroj en la popolaltlernejo de Karlskoga. Amplekse ilustrita. 95,- ĉe la Oslo-klubo

T-ĉemizoj ("Esperanto er kult"; "Esperanto la internacia lingvo"; "Vi snakker esperanto") 100 kr

Glumarkoj /klistremerker

La klubo ankoraŭ vendas ruĝajn glumarkojn 4 x 7 cm kun la teksto "nøytralt fredsremmende lettlært kontaktskapende" kaj la retadreso: www.esperanto.no inform a] esperanto.no Po 2 kr.

Ankaŭ kun verda stelo en parol-veziko (vd. bildon ĉe esperanto.se). Po 2 kr.

Taŭgas por valizoj, dorsosakoj, mansakoj, tekoj, monujoj ktp.

Stokoj de ĉi ĉiom en la kluboj; ankaŭ de vortaroj, gramatikoj, literaturo.

Lingvojaro en Norvegio

En 2013 ni festas la 200-jaran datrevenon de la naskiĝo de Ivar Aasen. Sed la organizantoj de la jubileo deklaris ke tio estu celebrado de la tuta lingva bunteco en Norvegio (vd. aasentunet.no → Språkkåret 2013),

Do ni jam registris nian landan kongreson en la interreta kalendaro ĉe språkkåret.no → kalender, kaj ni planas dum la kongreso aranĝi almenaŭ prelegon pri Aasen kaj Zamenhof, malferman al la publiko. Ĉu iu povas proponi ion pli, kio staru en tiu kalendaro, aŭ ĉu ni povos ion kontribui al jam anoncata aranĝo?

Landa kongreso – helpo pri ekskurso k.s. ?

Ni ankoraŭ bezonas helpon plani la ekskurson kaj la sabatovesperan programon dum la landa kongreso (en la meza semajnfino de junio en Haraldsheim). Vd. *Kluba Bulteno* 4/2012, p. 2.

PÅ NORSK: *Vi trenger en liten arbeidsgruppe som kan planlegge en utflukt og en festkveld under landsmøtet i Oslo i juni. Interesserte, meld dere til kontoret!*

Info-budoj en foiroj?

Nia planita informbudo kadre de la konferenco pri tutmondiĝo, *Globaliseringskonferansen*, ne povis okazi, pro malsano.

Domaĝe, ĉar tiajn aranĝojn kaj foirojn ni tre bezonas, sed bedaŭrinde ili ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en loka bibliotekto. Se vi vidos ion pri ia tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon, bv. sciigi tion al ni.
Si fra om du vet hvor vi kan få satt opp en liten utstilling eller info-bod.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter!

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo [a] esperanto.no>
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).